## 2025.11.17 Belgio

Saluton, S-ro Hori, por via "Voĉoj el la Mondo".

Mi observas, ke la situacio estas kritika ĉie en la mondo. Tio ŝuldiĝas al militoj (DRK, Ukrainio, Sudano, ktp.), sed ankaŭ al internaj militoj (Nepalo) aŭ simple katastrofa ekonomia situacio. Kiel en mia lando, Belgio, kie la nova dekstra registaro nuntempe aprobas leĝojn, kiuj malriĉigos la plej malriĉajn civitanojn, kondukante al multaj strikoj kaj manifestacioj.

Kiam mi vidas vastajn landojn finfine regatajn de nur kelkaj kamaradoj, mi diras al mi, ke io estas malĝusta. Precipe ĉar ĉi tiuj landoj havas influon super aliaj landoj. Ekzemple, Trump agis kiel peranto por trovi pacon en Ukrainio kaj ankaŭ en DRK, sed ŝajne sen ia ajn sukceso. Li pli interesiĝis pri la raraj teraj mineraloj, kiujn ĉi tiuj landoj posedas, ol pri efektiva fino de milito. Kaj se mi komprenas ĝuste, Nepalo ankaŭ havas malbonan ekonomion pro la influo de Usono, Ĉinio, ktp.

Mi certe estas utopia, sed ni devas komenci pensi pri malsama speco de monda ordo. Decidoj estus faritaj je kvartala, vilaĝa kaj urba niveloj, kaj poste, je la plej alta nivelo, je provinca nivelo. Rekte de la civitanoj, laŭ la principo de rekta demokratio. Kaj je tutmonda nivelo, devus ekzisti "komitato de saĝuloj", konsistanta el 50% virinoj, kiu farus ĉiujn tutmondajn decidojn. Neniu havus vetorajton. Sed antaŭ ol efektivigi ĉi tion, ni devas konsideri la redaktadon de tutmonda konstitucio. Unu, kie ekologio estus plej grava, ĉar sen vivkapabla planedo, ni estas nenio.

Havu bonan semajnfinon,
Viviane Tits

### 2025年11月17日 ベルギー

堀さん、「世界からの声」をお寄せいただきありがとうございます。

世界中で状況が深刻化しているように感じます。これは、戦争（コンゴ民主共和国、ウクライナ、スーダンなど）だけでなく、内戦（ネパール）や、単に壊滅的な経済状況によるものでもあります。私の母国ベルギーでも、新右派政権が現在、最貧困層の人々を貧困に陥れる法律を承認しており、多くのストライキやデモを引き起こしています。

広大な国が、少数の同志によって支配されているのを見ると、何かがおかしいと感じます。特に、これらの国は他国に影響力を持っているからです。例えば、トランプ大統領はウクライナとコンゴ民主共和国の和平交渉の仲介役を務めましたが、どうやら成果はなかったようです。彼は、戦争の終結よりも、これらの国が保有する希土類鉱物に関心を寄せていたのです。私の理解が正しければ、ネパールもアメリ

カや中国などの影響で経済が悪化しているようです。
　確かに私はユートピア主義者ですが、私たちは別の世界秩序について考え始める必要があります。意思決定は地域、村、都市レベルで行われ、最終的には最高レベルである州レベルで行われます。直接民主主義の原則に基づき、住民が直接決定を下すのです。そして世界レベルでは、50%が女性で構成される「賢人委員会」が、あらゆる地球規模の決定を下すべきです。誰も拒否権を持たないようにするべきです。しかし、これを実行に移す前に、世界憲法の起草を検討する必要があります。地球環境が最優先される憲法です。なぜなら、生存可能な地球がなければ、私たちは何の価値もないからです。
　良い週末を。　ヴィヴィアン・ティッツ

## Francio

Kara HORI Jasuo,
Vi demandis: **"kiel mi povas helpi vin pri via grandioza verko? Jasuo"**
— La bildstrio "Vivo de Zamenhof kaj historio de Esperanto"
estas efektive tre ambicia verkado, sed mi devas korekti la ideon, ke ĝi estus **"mia".**
Same kiel **Zamenhof** preferis resti ĝia iniciatoro por ke Esperanto vere apartenu al ĉiuj siaj uzantoj,

mi preferas, ke ĉiu partoprenanto en la verkado estu ĝia kunkreinto. 😉

Por respondi pli precize al via demando jen listo ne tute haltigita de farotaj taskoj →
Mi invitas senpagajn (…same kiel mi) kunlaborantojn.
**La laborkampoj estas multaj :** Historia serĉado, dokumentado, redaktado, kontrolado, korektado,
plibonigado, desegnado, tradukado, enpaĝigado, printado, eldonado, diskonigado, reklamado, ktp.
Ĉiu bonvolemulo (…preferinde esperantista sed ne nur) estas bonvena.
　Por sekvi la la laboradon eĉ sen rekte partopreni, mi ĵus kreis **whatsapp-grupon** en kiu oni povas aniĝi per la ligilo →
https://chat.whatsapp.com/Cml4M86APw4HLQE2xzAY8T
Per ĉi tiu ligilo oni kandidatiĝas por aniĝi al la Whatsapp-grupo (La grupo estas privata kaj sekura)
**"Vivo de Zamenho kaj historio de Esperanto per bildstrio**".
Post la ricevo de la kandidatiĝo, mi administre akceptas la novan partoprenanton.
Kiam oni aniĝis en la la Whatsapp-grupo-n, oni estas informata pri la evoluado de la verkado.
Ĉiu povas trovi sian taŭgan lokon por partopreni laŭ siaj eblecoj, nenio estante deviga…
Mi kaptas la okazon de ĉi tiu mesaĝo por gratuli vin pri
**ĉiuj viaj kreitaj agadoj →**

dispartigo de informoj per "Voĉoj el la mondo" kaj
la kuraĝigo al la legado per [http://www.esperanto-sumoo.pl/](http://www.esperanto-sumoo.pl/)
Ne hezitu demandi aliajn precizajn informojn pri la "en bildstrio Vivo de Zamenhof".
Amike de
--
**Jean-Pierre Cavelan**
Butiko →
[yanpetro-kavlan.fr](yanpetro-kavlan.fr)







1


2


3



4


5


6



7



**フランス**
堀 泰雄様
「あなたの素晴らしい作品について、何かお手伝いできることはありますか？」と質問いただきました。
— 漫画「ザメンホフの生涯とエスペラントの歴史」 は確かに非常に意欲的な作品ですが、「私のもの」という考えは改めなければなりません。ザメンホフが創始者であり続け、エスペラントが真にすべての使用者のものとなることを望んだように、 私もこの創作に参加するすべての人が共同制作者となることを望んでいます。
😉 ご質問に正確にお答えするために、以下にリストを示します。これは必ずしも作業内容に限定されるものではありません。
→ 無給の（…私のような）協力者を募集しています。仕事の分野は多岐にわたります。歴史調査、文書作成、編集、確認、修正、 改善、デザイン、翻訳、レイアウト、印刷、出版、普及、広告などです。あらゆる支援者（…できればエスペラントファンですが、それだけではありません）を歓迎します。
　直接参加されなくても作品の進捗状況を確認できるよう、WhatsApp グループを作成しました。リンクから参加できます → https://chat.whatsapp.com/Cml4M86APw4HLQE2xzAY8T このリンクから WhatsApp グループへの参加を申請できます（グループは非公開で安全です)。
　「漫画で見るザメンホフの生涯とエスペラントの歴史」 申請を受領後、新規参加者を事務的に承認いたします。
　WhatsApp グループに参加すると、作品の進捗状況についてお知らせします。 誰もが自分の能力に合わせて参加できる場を見つけることができます。義務はありません…
　このメッセージの機会をお借りして、 あなたのすべての創作活動にお祝いを申し上げます → 「世界からの声」を通じた情報発信、 そして http://www.esperanto-sumoo.pl/ での読書の奨励 「漫画で見るザメンホフの生涯」に関するその他の正確な情報については、遠慮なくお問い合わせください。 フレンドリーな -- ジャン＝ピエール・カヴラン ショップ → yanpetro-kavlan.fr

## 2025.11.20 Rusio

### Haltigu la mondmiliton (37) <originalo>

*19-a de novembro 2025*
Mi foje pripensas la ilojn kaj ŝancojn disponeblajn al la homoj de la mondo, kion ili povas fari por kontraŭbatali la mafiojn kaj korporaciojn interesitajn pri milito kaj murdo. Kaj la unua kaj plej grava afero estas simpla internacia komunikado — ju pli, des pli bone.
... La ribela kaj kontraŭmilita verkisto Lev Tolstoj skribis: "Se la forto de malbonaj homoj kuŝas en ilia unueco, tiam bonaj homoj, por fariĝi fortaj, devas fari la samon." ...
Mi sendas al vi miajn salutojn kaj estas eterne dankema pro via subteno kaj partopreno. Mi tre kompatas la mortigitajn senkulpajn homojn, la ukrainajn soldatojn kaj la politikajn malliberulojn en Rusio. Alia mia kolego estis arestita en Rusio; mi ankoraŭ ne scias la detalojn. Kaj ni devas kontraŭbatali tion per niaj kontaktoj. Amike

**2025年11月20日 ロシア 世界大戦を止めよう（37）**<原文> 2025年11月19日

私は時折、世界の人々が利用できる手段や機会、そして戦争や殺人に関心を持つマフィアや企業と戦うために何ができるのかを考えます。そして、まず第一に、そして最も重要なのは、シンプルな国際コミュニケーションです。多ければ多いほど良いのです。 …反逆者であり反戦作家であったレフ・トルストイはこう書きました。「悪人の強さが団結にあるならば、善人も強くなるためには、同じことをしなければならない。」… 皆様のご支援とご参加に心から感謝申し上げます。殺された罪のない人々、ウクライナ兵、そしてロシアの政治犯の方々に深くお悔やみ申し上げます。私の同僚の一人がロシアで逮捕されました。詳細はまだ分かりません。私たちは、人脈を通してこの戦いに挑まなければなりません。 Kasiko

## 2025.11.17 Ĉeĥio

En Čehio oni havis 36 jaran jubileon de Velura revolucio. En či tago tuta Čehio festas sian liberecon kaj sendependecon, kaj memorigas kiel facile estas čion perdi, se iu forta kaj granda Lando politike, finance, kaj armile minacas vín.

Slováka čefministro FICO petis g^eneralan pezidanton de NATA, ke defendo de aerspaco de Slovakio estu plifortita. Post liaj vizitoj al Moskvo, la peto aspektas strange.

EU priseverigas regulojn pór doni vizojn al rusojn en EU.

Denové okazis aer'atakoj al ukraina energetia sistemo per 50 raketoj kaj 470 milit'dronoj. Atakoj ankau estis al Harkiv.

Rusaj raketoj difektis ambasadejon de Azerbajg^an en Kyjiv. Post rusaj atakoj al Ternopil 16 civiluloj mortis kaj 64 ricevis diversajn vundojn, čiuj atakoj estis al log^domojn kaj civila infrastrukturo. Kiam rusoj atakis okcidentan parton de Ukrajino, Pollando aktivigis siajn rapid'aviadilojn pór rebati eblajn minacojn.

Dum lastaj 3 monatoj Polaj policistoj arestis 8 homojn (varbitajn de rusaj agentoj) pro preparo de sabotaj^oj. En fervojo okazis du eksplodoj faritaj de sabotistoj, ankau en eklaj lokoj oni trovis elsplod'materialojn kaj telefonojn ce ili pór distanca aktivig^o. Lau informoj en pasinta jaro en EU okazis 500 teroratakoj, faritaj de homoj varbitaj de rusaj agentoj. Ili estas kaj lokaj log^antoj kaj eksterlandanoj.

100 aviadilojn Rafal ačetos Ukrajino en Francio. Europa Komisio sendas al Ukrajino 5,9 miliardojn dá euroj pór stabilizacio de financoj.

Hispánio pagos 100 milionojn dá euroj al Usono por armiloj, radaroj, defend'sistemoj por Ukrajino.

En Prago okazis semajno de ukraina filmo, kaj festivalo de pola filmo. Čeha firmao havas konsenton kun Ukrajnio pri komuna produktado de dronoj. En universitatoj aperis kelkaj fakultatoj, kiuj instruas ekspluatadon, kaj produktadon de dronoj.

Grekio subtenos Ukrainion per livero de gaso.

Činaj oficistoj promesis subtranči kolon de japana čefministrino.

Rusa spionšipo Jantar kolektas informojn pri subakvaj kabloj če bordoj de Britio.

Tiaj estas informoj pór hodiau. Olga

**2025 年 11 月 17 日 チェコ共和国**

チェコ共和国はビロード革命 36 周年を祝いました。この日、チェコ共和国全体が自由と独立を祝い、強大な大国に政治的、財政的、そして軍事的に脅かされれば、いかに容易にすべてを失うことになるかを改めて認識しました。

スロバキアのフィツォ首相は、NATO 事務総長に対し、スロバキア領空防衛の強化を要請しました。モスクワ訪問後、この要請は奇妙に思えます。

EU は、EU 域内のロシア人へのビザ発給規則を厳格化しています。

ウクライナのエネルギーシステムへの空爆は、ミサイル 50 発と軍用ドローン 470 機によって再び行われました。ハリコフへの攻撃もありました。 ロシアのミサイルがキイウのアゼルバイジャン大使館に被害を与えました。ロシアによるテルノーピリへの攻撃では、民間人 16 人が死亡、64 人が負傷しました。すべての攻撃は住宅と民間インフラを標的としていました。

ロシアがウクライナ西部を攻撃した際、ポーランドは潜在的な脅威に対抗するため高速ジェット機を投入しました。 過去 3 ヶ月間で、ポーランド警察は破壊工作の準備をしたとして、ロシア工作員に雇われた 8 人を逮捕しました。鉄道で 2 件の爆発があり、いくつかの場所で爆発物と遠隔操作可能な携帯電話が発見された。情報によると、昨年 EU ではロシア工作員に雇われた者によるテロ攻撃が 500 件発生しました。彼らはウクライナ在住者と外国人の両方です。

ウクライナはフランスからラファール戦闘機 100 機を購入する予定だ。欧州委員会はウクライナの財政安定化のため、59 億ユーロをウクライナに送金する。

スペインはウクライナ向け兵器、レーダー、防衛システム購入のため、米国に 1 億ユーロを支払う予定だ。

プラハでウクライナ映画週間とポーランド映画祭が開催された。チェコの企業がウクライナとドローンの共同制作で合意した。大学にはドローンの運用と製造を教える学部が複数設置されている。

ギリシャはウクライナにガス供給を支援する。

中国当局は日本の首相の首を切ると約束した。

ロシアの諜報船ヤンタル号はイギリス沖の海底ケーブルに関する情報を収集している。これが今日の情報です。オルガ



## DRKongo

SILENTO
Silento estas armilo, kiun la saĝuloj majstras.
Ĝi ne estas uzata por fuĝi, sed por observi tion, kion kolero malhelpus vin vidi.
Estas aferoj, kiujn estas pli bone lasi nediritaj, ne ĉar ili ne meritas esti diritaj, sed ĉar tiu, kiu devas aŭdi ilin, ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por kompreni.

Lernu silenti kiam ĉio invitas vin reagi.

Lernu rideti kiam la mondo volas vidi vian koleron.
Jen vera forto: restu trankvila kie ĉiuj aliaj koleras.
Kaj pardono, Avo diras ĝin al vi, ne estas forgesi kion estis farita al vi, estas rifuzi esti kaptito de via doloro.
Ĉar tiu, kiu ne pardonas,
portas ĉiutage la pezon de tiu, kiu vundis lin.
Vi pensas, ke vi punas alian personon tenante rankoron, sed estas vi mem, kiun vi malrapide mortigas.
Pardonu, ne por ili, sed por via propra paco.

Ĉi tiu mondo bezonas homojn, kiuj alportas pacon, ne homojn, kiuj incitas.
Homoj, kiuj resanigas, ne homojn, kiuj remalfermas malnovajn vundojn.
Kaj jen kion ni faras ĉi tie: ni instruas pacon, memregadon kaj fidon.
Ni ne atakas iun ajn, ĉar ĉi tie ni ne nur parolas al oreloj,ni parolas al koroj.
Kore, Honoré Sebuhoro de Rutshuru
Honore Sebuhoro honsebn@gmail.com

**民主コンゴ共和国**

沈黙

沈黙は賢者の武器です。
それは逃げるためではなく、怒りによって見えなくなってしまうものを観察するために用いられます。
言わない方が良いこともあります。それは、言うに値しないからではなく、聞くべき人がまだ理解できるほど成熟していないからです。

あらゆるものがあなたに反応を促しているとき、沈黙することを学びましょう。
世界があなたの怒りを見たいとき、笑顔を学びましょう。
これが真の強さです。皆が怒っているとき、冷静でいること。
そして、おじいちゃんが言うには、許すということは、自分にされたことを忘れることではなく、自分の痛みの囚人になることを拒否することなのです。
なぜなら、許さない人は、 毎日自分を傷つけた人の重荷を背負っているからです。
あなたは恨みを抱くことで他人を罰していると思っていますが、実はゆっくりと自分自身を殺しているのです。
許しなさい。相手のためではなく、あなた自身の平和のために。

この世界に必要なのは、扇動する人ではなく、平和をもたらす人です。
古傷を再び開く人ではなく、癒す人。

そして、それが私たちがここで行っていることです。平和、自制心、そして信頼を教えています。
私たちは誰も攻撃しません。なぜなら、ここでは耳に訴えるだけでなく、心に訴えかけるからです。
敬具、ルツシュルより、オノレ・セブホロ オノレ・セブホロ honsebn@gmail.com

## 2025.11.26 Ĉeĥio

Saluton sinjoro Jasuo.

Hierau en Prago oni disdonis brošuron "72 horojn". En kiu estas skribite kion fari en krizaj situacioj. Lau mi g^i estas ne tro utila, sed eč g^I estas pli bone ol nenio.

Čiujare Čehion vizitas proksimume 18 milionoj dá turistoj, multnombraj eksterlandanoj studas en Čehio, laboras en gradaj korporacioj, kaj ankau granda kvanto de fug^intoj (diversnaciaj, sed plejmulte ukrainaj). En la brošuro ne estis uzitá iu fremda lingvo, nur čeha. Do en kriza situacio ili estos ne preparitaj, tumultaj eč senhelpaj. Kaj certe ne čiuj konsiloj taugas okaze de milito (ekzemple ke via domo estas sekura loko).

En Holando oni vidis rusajn milit'dronojn en flughaveno. Tempo al tempo iuj teroristoj (varbitaj kaj pagitaj de rusoj) atakas en preskau čiuj europaj landoj. Sed malgrau čio estas politikistoj, kiuj rusan minacon prenas facilanime.

Aperis informoj ke sinjoro TRUMP per siaj asistentoj transdonis al sinjoro ZELENSKÝ postulojn de rusa flanko. Li diris, ke g^i estas paca Plano, bona pór čiuj, sed tuta karaktero de Plano sonas kiel vulgara senhonta čantag^o.

Antau kelkaj monatoj sinjoro TRUMP subskribis kun sinjoro ZELENSKÝ konsenton pri ukrainaj mineraloj kaj usonaj armilojn. Sed nun li česis aldoni armilojn, kaj čantag^as ZELENSKÝ. Do kiu garantias ke Plano de TRUMP validas post du-tri monatoj? Li šang^as sian pozicion kiel ventmontrilo en autuna tago.

Al mi estas strange ke Plano enhavas indulgon pór Militkrimulojn! En fino de dua Mondmilito militkrimuloj ricevis pendumilojn. Do kion šang^is de tiu tempo en Usono?, nocio de justeco kaj prezidento.

Ču dua Mondmilito finig^is ke usona prezidento diris: Adolfo mi estas malkontenta? Kaj poste dancadis valson kun militkrimulo en Alasko? Io ege malodoras en Blanka Domo kiel putrita viando.

Tia estas hodiaua situacio. Olga

**チェコ共和国**

ヤスオさん、こんにちは。

昨日、プラハで「72 時間」というパンフレットが配布されました。緊急事態にどう対処すべきかが書かれています。私の意見では、あまり役に立たないかもしれませんが、何もないよりはましです。

チェコ共和国には毎年約 1800 万人の観光客が訪れ、多くの外国人留学生や国営企業で働く人々がいます。また、多くの難民（多国籍ですが、ほとんどがウクライナ人です）も訪れます。パンフレットには外国語は一切使われておらず、チェコ語のみでした。そのため、緊急事態が発生した場合、彼らは準備不足

で混乱し、無力感に陥ることになります。そしてもちろん、戦争の際には必ずしもすべてのアドバイスが当てはまるわけではありません（例えば、自宅は安全です）。

オランダでは、空港でロシア軍のドローンが目撃されました。ほぼすべてのヨーロッパ諸国で、ロシア人によって雇われ、雇われているテロリストによる攻撃が時折発生しています。しかし、それにもかかわらず、ロシアの脅威を軽視する政治家もいます。

トランプ氏が側近を通じてゼレンスキー氏にロシア側の要求を伝えたとの報道がありました。トランプ氏は、これは平和的な計画であり、誰にとっても有益だと述べましたが、その計画全体の内容は、下品で恥知らずな脅迫に聞こえます。 数ヶ月前、トランプ氏はゼレンスキー氏とウクライナの鉱物資源と米国の兵器に関する協定に署名しました。しかし今、彼は兵器の追加を中止し、ゼレンスキー氏を脅迫しています。では、トランプ氏の計画が 2、3 ヶ月後に有効になると誰が保証するのでしょうか？彼は秋の日の風向計のように立場を変えています。 この計画に戦争犯罪者の恩赦が含まれているのは奇妙に思えます！

第二次世界大戦の終結時、戦争犯罪者は絞首刑に処されました。では、それ以来、アメリカで何が変わったのでしょうか？正義と大統領の概念です。 第二次世界大戦は、アメリカ大統領が「アドルフ、私は満足していない」と言って終結したのでしょうか？それからアラスカで戦争犯罪者とワルツを踊った？ホワイトハウスは腐った肉のようなひどい臭いがします。

これが今日の状況です。オルガ